

## **KUNVOKO**

### **al la Jarkunsido de Kulturdomo de Esperanto**

### **la 26an de majo 2018 en kastelo Greziljono je la 14a 00**

La jarkunveno okazos sabaton, la 26an de majo 2018. Registrado de la ĉeestantoj komenciĝos je la 13a 30 en salono Zamenhof.

Se vi deziras alveni en la kastelon jam vendredon vespere aŭ resti ĝis dimanĉo, bonvolu informi nin rete. Dimanĉon okazos Komitatkunsido. Dum la semajnfino, la kastelon okupos grupo de luantoj: ni mem loĝos en la kromdomoj.

Societano, kiu ne povos ĉeesti, bonvolu sendi sian rajtigilon kompletigitan per la nomo de societano, kiu ĉeestos la jarkunsidon, kontaktinte tiun ĉi, por obei la statutan regulon limigantan la nombron de rajtigiloj je 5 por ĉiu persono. Vi povas konsulti, en la rubriko "Membrokunvenoj" de nia retejo, [www.gresillon.org/kunveno](http://www.gresillon.org/kunveno), la liston de la societanoj, kiuj anoncis sian ĉeeston.

*NB: okaze de rajtigilo ne kompletigita, tiu ĉi ne uzeblas por voĉdonoj sed estos enkalkulata por la kvorumo, nome 1/6 de ĉiuj societanoj – do 42 – necesa, por ke la Jarkunsido povu valide labori.*

## **Tagordo**

- 1) elekto de la prezidanto kaj sekretario de la kunsido,
- 2) nombrado de la ĉeestantoj kaj de la rajtigiloj,
- 3) evoluo de la nombro de la societanoj, kontrolo de la kvorumo,
- 4) agadraporto 2017, diskuto kaj voĉdono (dum la kunsido),
- 5) financa raporto 2017, diskuto kaj voĉdono (dum la kunsido),
- 6) aprobo de la kontoj pri la jaro 2017 kaj imputo de la profito 2017.
- 7) buĝeto 2018,
- 8) kvitigo al la Komitato,
- 9) rezulto de la voĉdonado pri la Komitato,
- 10) konstrulaboroj: aktuala situacio kaj prioritatoj,
- 11) partnereco Kulturdomo / asocio CdG / ebla partnero Rempart aŭ CHAM, ebliganta kunordigadon de volontulaj konstruantaroj,
- 12) aliaj demandoj.

## **Evoluo de la nombro de societanoj**

La 31an de decembro 2017, kalkulinte forpasojn, donacojn de societaj partoj, perdon de societanecon, se oni ne donis vivsignon dum tri jaroj, restis 267 societanoj kun 943 societaj partoj A (je 16 €). 204 societaj partoj B (je 200 €) estis akiritaj. Dum la jaro 2017, 9 novaj societanoj aliĝis, 8 societanoj donacis siajn societajn partojn, 5 societanoj forpasis, 2 societanoj estis forigitaj (sed reakiro de societanecon se ili petos) kaj 1 societano aĉetis kromajn societajn partojn.

## **Agadraporto**

La jaron 2017 ree markis duobla ĉeestado en la kastelo: Isabelle N. ĉeestis inter mezo de aprilo kaj mezo de oktobro, celante disvolvi nian agadon kaj okupiĝi pri la ludonoj, sed post 4-jara deĵorado en Greziljono, ŝi ne daŭrigos. Nun ni deĵoras laŭvice kaj ĝojus, se aliaj fidindaj volontuloj ekspertiĝos por prizorgi luigojn. Geneviève B., elektro-hipersentema, ĉeestis de januaro ĝis mezo de aprilo kaj ekde mezo de novembro.

Ne kalkulante la ĉeeston de Isabelle N. kaj Geneviève B., dum la jaro 2017, la kastelo estis okupita dum 214 tagoj, t.e. 59% de la tempo: 61 tagoj da staĝoj, 67 tagoj da ludonoj, 76 tagoj da konstrulaboroj, 5 tagoj da ne-eperantistaj aranĝoj kaj 2 tagoj por la jarkunveno kaj komitatkunveno (krom la 4 telefonaj komitatkunvenoj). La nombro de tagoj de Esperanto-staĝoj restas konstanta ekde 2015: ĉirkaŭ 60 tagoj jare. Preskaŭ ĉiuj semajnfinoj inter la 20a de marto kaj la 5a de novembro estis okupitaj, al kio aldoniĝis 4 semajnfinoj luigoj en novembro kaj decembro.

La renkontiĝo de la ĥoro Interkant' kunigis 18 ĉeestantojn de la 5a ĝis 9a de aprilo. Jannick Huet staĝestris, Zdravka Lenepveu ĥorestris kaj Valérie Delaire kuiradis.

La staĝo PRINTEMPaS, de la 14a ĝis 22a de aprilo, kun intensaj kursoj, kunigis 45 ĉeestantojn, el kiuj 9 trapasis la ekzamenon de ILEI. La kursojn gvidis Zsafia Korody, Christophe Chazarein kaj Marion Quenut. La ekzamenantaro konsistis el Zsafia Korody kaj François Lo Jacomo. Samtempe, de la 15a ĝis la 20a de aprilo okazis AMO por la movadaj aktivuloj, kun Stefan MacGill, Sara Spanò et Mireille Grosjean. Jannick Huet staĝestris kaj Thierry C. kuiris.

La someraj staĝoj okazis dum 4 semajnoj, kiel en 2015 kaj 2016, t.e. 4 staĝoj kun respektiva daŭro 7, 10, 8 kaj 7 tagoj, sume 32 tagoj.

La tria semajno de reciprokaj interŝanĝoj de scioj kaj scipovoj, de la 4a ĝis la 11a de julio, kiun staĝestris Elisabeth Barbay, kunvenigis 26 membrojn de SEL, JEU kaj RERS.

La staĝo Renkontiĝo de Alternativoj okazis de la 17a ĝis la 27a de julio, kun 20 partoprenantoj. Xavier Godivier staĝestris.

Samtempe, de la 10a ĝis 27a de julio, t.e. dum 17 tagoj, okazis maratona E-kurso kun Perla Mielo kaj Louis Jeuland kiel instruantoj kaj 16 lernantoj, el kiu 4 lernantoj restis dum la tuta daŭro de la staĝo.

La 7an festan semajnon por infanoj kaj familioj, de la 5a ĝis la 13a de aŭgusto, kun Bert Schumann kiel staĝestro, Nicky Janssen, Elisabeth Barbay, Ansofi Markov, Caroline Mauboussin, Marie Savary, Larisa Osadčuk, Alain Delmotte kaj Jean-Luc Kristos kiel animantoj aŭ instruantoj, ĉeestis 55 homoj, inter kiuj 7 alilandanoj kaj 23 infanoj kaj junuloj 1- ĝis 25-jaraj.

La 2a staĝo «SOMERaS», okazis de la 21a ĝis la 28a de aŭgusto, kun Jannick Huet kiel staĝestro, Jean-Luc Kristos kiel instruanto kaj 6 animantoj kaj muzikistoj por tradiciaj dancoj. Inter la 31 ĉeestantoj, el kiuj 9 alilandanoj, 6 landoj estis reprezentitaj. Dimanĉon, la 27an de aŭgusto, okazis popola balo sur placo de Eŭropo en Baugé. La 3 lastajn tagojn aldoniĝis 9 membroj de EDE, kiuj okazigis sian 10an someran universitaton.

Tiuj ĉi kvar staĝoj kunigis 164 homojn. Kuiris Thierry C..

Migrada semajno de la 11a ĝis la 15a de septembro, gvidata de Olivier Buisson, logis 6 migremulojn.

La 6an staĝon AŬTUNE, de la 27a de oktobro ĝis la 4a de novembro, staĝestris Bert Schumann kaj Jannick Huet, kun Stano Marček, Elisabeth Barbay kaj Bert Schumann kiel instruantoj kaj animantoj. Samtempe, de la 27a ĝis la 31a de oktobro, Zdravka Lenepveu gvidis la ĥoron Interkant' kiel ĥorestro. Kadre de Interkant, Jannick Huet organizis la 29an de oktobro en la granda urba salono « René d'Anjou » koncerton kun 3 aliaj ĥoroj de la regiono. Inter la 47 ĉeestintoj troviĝis 14 lernantoj, el kiuj 6 infanoj 5- ĝis 15-jaraj, 2 manlaborantoj kaj 24 kantistoj de Interkant. Kuiradis Thierry C.

Sume, dum la jaro 2017, la 61 tagojn de tiuj 8 staĝoj vizitis 278 homoj (254 en 2016, 242 en 2015, 204 en 2014) kun 4.164 manĝoj (4.438 en 2016, 4.090 en 2015, 3.340 en 2014) kaj 1941 tranoktoj (1519 en 2016, 1455 en 2015, 1181 en 2014).

Ekde 2017, la duontarifo por infanoj aplikiĝas ankaŭ por adoleskantoj kaj personoj kun malgrandaj vivrimedoj: studentoj, junuloj, senlaboruloj. Bonvolu informi pri tio viajn konatulojn.

### **Agado de Isabelle Nicolas**

La asocio « Kampo de la Griloj », prezidata de Isabelle Nicolas, daŭrigas sian agadon por helpi la Kulturdomon kiam eblas, ĉar la asocia strukturo ebligas klopodojn, kiujn ne povas kooperativo pro sia privateco. Ekzemple urban salonon eblis rezervi senkoste.

Isabelle organizis la 15an de aprilo posttagmezon «Poezioj de la Mondo» partnere kun «Vilaĝo en Poezioj» de Cheviré-le-Rouge, kio ebligis venigi al Greziljono loĝantojn de la ĉirkaŭaĵo.

La 16an de julio, fine de la staĝo pri Interŝanĝoj, Isabelle, per «Kampoj de la Griloj» organizis ekstere publikan interŝanĝon de senkostaj varoj.

La Eŭropaj Tagoj pri Kulturheredaĵo okazis en Greziljono la 3an fojon la 16an kaj 17an de septembro, kun teatreca gvidado, ekspozicio de la arĥivoj en salono Zamenhof kaj ĵonglateliero kun Jean-Manu. Dum tiuj 2 tagoj, 9 grupoj sekvis la viziton, sume ĉirkaŭ 70 homoj vidis la kastelon.

## **Luigoj**

Jam kvinan jaron la kulturdomo fincas sin per luigo al privatuloj. La 22 luadoj enspezigis entute 34 303 € malnete (inkl. AVI). La ludono al la 17a renkontiĝo FESTO estis nuligita de Espéranto Jeunes. Dum 1 semajno en aŭgusto, belga esperantisto kun sia filo festis sian naskiĝtagon en ĉeesto de 39 Esperantistoj el 8 landoj kaj 23 belgaj invititoj. En septembro, grupo de naturistoj ĝuis la belan kadron de la kastelo.

Kvar luigoj utiligis nian kuiriston. La ĉambrojn antaŭ la ludonoj kaj staĝoj purigis Amélie S. kaj Catherine B.

## **Konstrulaboroj**

Dum 76 tagoj, labortage aŭ semajnfine, volontulaj laborantoj daŭrigis la komencitajn konstruojn.

En la kastelo, la argilaj kaheletoj estis ŝirmitaj per lin-oleo en ĉambro 26, necesejo kaj antaŭŝtuparo de la dua etaĝo. Per tapetpapero oni tegis la ĉambron 10. La vitriĝo de la planko teretaĝe per profesiulo iĝis malsukcesa: helpe de asekurkompanio, ni provos juran proteston.

En la kuirejeto de la trinkejo, René Jelenc konstruis belan oportunan meblon por la lavkuvo kaj la gasbotelo. Li ankaŭ algluis kahelojn en la duŝejoj de la unua etaĝo, por eviti ŝimaĵojn.

Pri la alireblo al handikapuloj (PMR = Personoj kun Moveblo Reduktita), okazis multaj rendevuoj kaj klopodo cele al taksado kaj buĝetado de la konstrulaboroj. Unuan donac-alvokon ni lanĉis por tiuj ĉi konstrulaboroj. Sed malfacilas la decidoj pro multaj kialoj, kiujn ni mencias dum la jarkunveno.

En la legomĝardeno, Patrice Kazenave restaŭris la metalan pordegon.

Koncerne la lavejon, post restaŭro de la ĉarpentaĵo en 2016, novajn ardezojn metis Pierre Grollemund kaj aliaj volontuloj. René Jelenc daŭrigas la renovigon/renovigon de la akvo-baseno.

Koncerne la arbojn, ni daŭrigas la forigon de la bambuoj, kiuj fariĝis invademaj. Bert Schumann daŭre prizorgas kaj debranĉigas la 236 poplojn kaj tondas la heĝojn.

Kaj jen la konstrulaboroj faritaj de firmaoj:

Ŝtontajlisto restaŭris la centran frontonon super la ĉambroj 26 kaj 27, kaj la 4 finialetojn de la apuda fasado. Tegmentisto renovigis la tegmenteron kaj la zinkajn tegaĵojn malantaŭ tiu ĉi frontono (dua parto de la urĝaj riparoj, kiu kostis 22 386 € nete). Antaŭgardaj riparoj daŭras, por eviti falon de ŝtonoj.

Anstataŭigo, fare de hejtisto, de la regulilo en la hejteja substacio, programita en 2016, okazis komence de 2017.

Pri la rivereto Altrée, la sindikato pri riveretoj alfluaj al Authion igis purigi la fluejon de la rivereto kaj tranĉi la arbustojn ĉe la akvo. La hakado kaj vendado de ligno fare de nia hakisto enspezigas ĉirkaŭ 1000 € jare.

Ni danku Bert Schumann, Claude Bensimon, Dominique Baron, Francis Bedon, François Lo Jacomo, Frédéric Dambreville, Frédéric Lauriol, Frédéric Neyret, Geneviève B., Isabelle Nicolas, Jean-Jacques Moreau, Jesse O'Scanlan, Michel Marchand, Nathalie Dubrulle, Nathalie Kesler, Patrice Cazenave, Pierre Grollemund kaj Yves Couturier, kiuj partoprenis la diversajn semajnfinojn kaj volontulajn konstruejojn.

## **Financa raporto**

Por la jaro 2017, la sumo de la enspezoj atingas 89 146 €, do 13% malpli ol en 2016 sed 7% pli ol en 2015. La staĝaj enspezoj iomete malpliigis: 38 771 € anstataŭ 43 719 € en 2016. La entuta malkresko devenas ĉefe de la ludonoj, pro la nuligo de FESTO, kaj pro du-semajna infanferiado en 2016.

Ni sukcesis atingi novan ŝtupon en la prizorgado de la kastelo (renovigo de la centra frontono kaj de la tegmento malantaŭ tiu ĉi frontono) kontraŭ entute 22 400 €, entute financataj per la jaraj enspezoj. La kostoj estas stabilaj koncerne salajrojn kaj socialajn kostojn kaj ankaŭ energikostojn, malaltiĝis la manĝokostoj (pro granda stoko komence de la jaro) kaj forte altiĝis la impostoj kaj taksoj (bien-imposto + 67% pro apliko de nova kalkulmaniero de la lu-valoro por profesiuloj).

La sumo de la kostoj, lu-makleraĵoj kaj vojaĝkostoj estas stabila.

La societa kapitalo altiĝis je 22 928 € (– 272 € pro societaj partoj A kaj + 23 200 € pro societaj partoj B). Tio ĉi ŝuldiĝas interalie pro akiro de societaj partoj B sekve de la alvoko al donacoj farita por konstruo de ĉambroj PMR. Pro la sama kialo, la konto “donacoj” multe altiĝis: + 6 550 €.

La ĉapitro “aliaj vendoj” malaltiĝis. Interalie altiĝis je 37% la libro-vendado (1165 €).

Koncerne disponeblan monon, ni havis je 31/12/2016 entute 135 017 €, el kiuj 19 747 € en ĉekkontoj, 98 269 € en ŝparkontoj kaj 17 000 € kiel societaj partoj de nia banko Banque Populaire.

La bilanco montras etan profiton je 1505 €, malatiginta je 88%. Tiu ĉi profito rezultas nur de la sumo de donacoj por PMR-ĉambro, ricevitaj tute fine de la jaro, ĝis entute 7 000 €. Sen tiuj donacoj kun difinita celo, ni havus malprofiton je 5 500 € proksimume. Ni devos esti tre prudentaj koncerne planitajn elspezojn en 2018, des pli ke malrapide venas luantoj – dum la printempo, la kastelo estas malpli okupata ol kutime.

*La financaj tabeloj (bilanco, spezkonto, buĝeto) ne estas senditaj kun ĉi tiu kunvokilo: ili estos publikigitaj sur nia retejo kaj estos disdonitaj dum la jarkunveno.*

## Somera programo 2018

Resumo de la someraj semajnoj 2018 kun Esperanto-kursoj



| 2018-jul-09/16<br>(S1)  | 2018-jul-16/21<br>(S2)  | 2018-jul-21/27<br>(S3)   | 2018-aŭg-11/19<br>(S4)  |
|---|---|--|---|
| <p>Interŝanĝoj de scioj kaj faroj kun <i>Elisabeth Barbay, Isabelle Nicolas</i></p>  <p><a href="http://gresillon.org/s1">gresillon.org/s1</a></p> | <p>Semajno de ĉiĉeronado en la regiono <i>Anĵuo</i> kun <i>Catherine Kremer, Jannick Huet</i></p>  <p><a href="http://gresillon.org/s2">gresillon.org/s2</a></p>                                 | <p>30a Internacia Esperanto-Konferenco de OSIEK kun <i>Xavier Godivier</i></p>  <p><a href="http://gresillon.org/s3">gresillon.org/s3</a></p> | <p>Festa Semajno por infanoj, adoleskantoj, familioj kaj geavoj kun <i>Nicky Janssen, Larisa Osadčuk, Bert Schumann</i></p>  <p><a href="http://gresillon.org/s4">gresillon.org/s4</a></p> |
| <p>Maratona Esperanto-kurso 1 kun <i>Perla Mielo, Louis Jeuland</i></p>  <p><a href="http://gresillon.org/s1">gresillon.org/s1</a></p>             | <p>Speciala Semajno kun Maratona Esperanto-kurso 2 kaj kurso de la franca kun <i>Nina Daniljuk, Perla Mielo, Anaël Pineau</i></p>  <p><a href="http://gresillon.org/s0">gresillon.org/s0</a></p> | <p>Maratona Esperanto-kurso 3 kun <i>Mikaelo Bronŝtejn, Perla Mielo</i></p>  <p><a href="http://gresillon.org/s3">gresillon.org/s3</a></p>    | <p>Esperanto-kurso kun <i>Jean-Luc Kristos, ...</i></p>  <p><a href="http://gresillon.org/s4">gresillon.org/s4</a></p>   |

Vi povas informiĝi pri niaj staĝoj kaj aliĝi diversmaniere:

- en nia retejo sub: [gresillon.org/agendo](http://gresillon.org/agendo) kaj: [gresillon.org/aligho](http://gresillon.org/aligho)
- per retmesaĝo al: [kastelo@gresillon.org](mailto:kastelo@gresillon.org)
- per telefonvoko al: +33-2 41 89 10 34 (aŭtomata respondilo), +33-6 51 24 24 23 (Bert), +33-2 99 83 69 86 (Jannick)
- per poŝta letero al la sekretario: Schumann/MCE, 9 rue du Couradin, 35510 Cesson-Sévigné

La Kulturdomo de Esperanto bezonas vian helpon!

Bonvolu aliĝi kaj aligi viajn amikojn.

# SINPREZENTOJ DE LA KANDIDATOJ

## **Serge SIRE**

74jara emerito de la nacia edukado, eks-fakinstruisto pri teknologio kaj informadiko, mi konatiĝis kun la kulturdomo en la jaroj 1980 en la periodo de Ge-Babin. Mi partoprenis en relative multaj staĝoj, ĉefe dum la Babin periodo, kiel animanto, kaj denove pli freŝdate, preskaŭ ĉiam kiel animanto, tre malofte kiel staĝanto. Mi ja tre ŝatus pli ofte partopreni sed malhelpas granda distanco inter Greziljono kaj mia loĝ-urbeto (~700km) kio signifas ne bagatela elspezo, sed ĉefe, longan tedan vojaĝon. Administraj zorgoj ne estas mia preferata te-taso, tamen pro la nunaj bezonoj, mi decidis kandi-datiĝi. Pri Esperanto, mi parolas flue sed ofte tordas la kolon al gramatiko, ĉefe al akuzativo, sed ne pli grave ol kion mi suferigas al mia infana lingvo, nome la franca (ne de mia gepatra, kiu estis miksado de franca kaj okcitana...).

## **Brigitte ARDON**

61 jaraĝa, pensiulino Ekde mi praktikis Esperanton, mi kutime ĉeestis en la kastelo Greziljono. Mi partoprenis staĝojn en 2006 (verkosemajno), 2010 kaj 2013 (somerajkursoj). Mi tre ŝatis volontule labori (2010). Mi ĉiam interesiĝis pri la historio de la MCE kaj ĝia estonteco. Mi ŝatus pli ĝenerale okupiĝi pri la vivo de Kulturdomo de Esperanto kaj plu labori kiel bonvolulino.

## **Louis-Nicolas BABIN**

Denaska esperantisto, Greziljonano de la aĝo de ses monatoj, mi estis volontulo dum multaj jaroj, poste salajrito. La vivo malproksimigis min de Greziljono, sed mi vere emas reinvestiĝi. Mi ŝatas tiun bienon, tion kion ĝi vehiklas kaj mi deziras ke ĝi evoluu plu.

## **François LO JACOMO**

63-jara, Esperantisto depost 1971, mi havis diversajn funkciojn en la Esperanto-movado: ekzemple nun kiel unu el la reprezentantoj de UEA en Unesko. Mi multe vizitis Greziljonon ekde 1972, kaj revenis post longa paŭzo antaŭ deko da jaroj. Prezidanto inter 2010 kaj 2016, mi partoprenis interalie ŝanĝojn de la statuto. Tie mi konatiĝis kun Nathalie Kesler en 2014, ni nun vivas kune. Pro statuto, mi ne rekandidatiĝis en 2016 sed pretas nun reveni: pluraj defioj atendas nin, sed ni ja sukcesos atingi celojn ne penseblajn antaŭ dek jaroj. Intertempe, mi ne ĉesis kunlabori. Profesie, mi nun finas karieron kiel instruisto pri matematiko, sed ankaŭ doktoriĝis pri lingvistiko, per disertacio titolita "Libereco aŭ aŭtoritato en la evoluo de Esperanto".

## **Pierre DIEUMEGARD**

62-jaraĝa, mi instruas natursciencojn en Orléans, kie mi partoprenas la lokan asocion de esperanto Espéranto-Loiret. Mi iris al Grésillon ĉefe por kunvenoj de Eŭropo-Demokratio-Esperanto kaj por ekzamenoj KER. Ĉar mi kutime uzas rulseĝon por iri tien kaj reen, mi ĉefe zorgos pri la alirebleco de la kastelo por handikapuloj.